

BOULOGNE SUR MER  
31, BOULEVARD MARIETTE

la 10<sup>an</sup> de Marto 1932

Kara Amiko

Antaŭ mi via P.K. de la 7<sup>a</sup> de Feb, bela bildaĵo estas + mi pri ĝi multe dankas vin. Mi bedaŭras ke vi neniam havas tempon por letereton skribi ĉar estis agrable korespondi kun vi mia korespondinto de 1920 + 1921.

Oni multe parolas pri via bela lando en Francujo + Tchecho Slovakujo + ĝiaj landanoj estas tre tre simpatiaj al ĉiu franco.

Antaŭ kelka tempo min vizitis S<sup>ino</sup> kiu ankaŭ loĝas en Parizo + ŝi multe okupiĝas pri gimnastiko, fizikaj ekzercadoj + movoj k.t.p. ankaŭ pri dancado. Ŝi konatiĝis kun (?) fama praha dancisto S<sup>ro</sup> Malkowsky + ŝi ŝatus scii ĉu vere li estas fama aŭ eĉ konata en Praha. Ĉu, hazarde, vi jam aŭdis pri li?

Ĉu vi aliĝis al la Pariza Kongreso? Ni havas la Nojn 168 + 169. Ŝajnas ke la fremduloj sin rezervas. Multaj francoj aliĝis, ne multaj alilanduloj. La krizo estas la kaŭzo + ĉiuj atendas kun fermita poŝo + malfermitaj oreloj. Kio okazos?

Mia amiko en Zagreb D<sup>ro</sup> S. Rosenstock jam aliĝis. Li neniam vizitis Francujon. D<sup>r</sup> Broder sendube pro la terura pola krizo ne venos. La familio Zamenhof kiu tamen ricevis 9 kartojn de la L.K.K. en Parizo ne scias pro la krizo ĉu ili havos sufiĉe da mono por veni.

Kaj vi + via familio? Ĉu vi ĉiuj bone fartas? Vi estos malsana se vi laboros tiel freneze.

Mia edzo kun mi sendas al vi + via Edzino niaj<sup>1</sup> plej korajn amikaĵojn.

Via granda Sokola gazeto estas plensukcesa ĉie + de tiuj<sup>2</sup>. De nove grandan dankon

Premante viajn manojn - amike

via, Acie Sergeant

Ho ve! ni ne iros Prahon.

---

<sup>1</sup> ĉu "niajn"?

<sup>2</sup> ĉu "ĉiuj"?